

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 5

Septembro/Oktobro 1965

POST 18 MONATOJ - IN 18 MONATEN

La 19a IFEF-kongreso okazos 1967 en Fulda. Gastigantoj estos ni, la germanaj esperantistaj fervojistoj.

Certe ankaŭ vi opinias, ke la sukceso de tiu kongreso ne povos dependi nur de kelkaj personoj. Ankaŭ via kunhelpo necesas. Jen kelkaj konsiloj tiucele:

Atentigu viajn kunulojn pri la kongreso! Centoj da profesiaj kolegoj el oriento kaj okcidento renkontiĝos. Sen lingvaj malfacilaĵoj kaj sen interpretistoj.

Plibonigu vian lingvan scipovon! Vi volas paroli kun viaj eksterlandaj geamikoj — ne balbuti.

Propagandu lingvajn kursojn por komencantoj kaj progresintoj! Por kolegoj en ŝanĝa servo ekzistas leterkursoj.

Gajnu simpatiojn! Nur malmultaj volas lerni Esperanton, sed multaj estas pretaj por helpi finance aŭ morale.

Aliĝu por la tuta daŭro de la kongreso! Nur la ĉeestantaj kongresanoj decidas pri la sukceso, ne la antaŭe forvojaĝintaj.

Bonvenaj estas ankaŭ la familianoj, la pensiuloj kaj la junaj esperantistaj fervojistoj. Eluzu tiun favoran okazon de internacia renkontiĝo en Germanio!

Ankoraŭ io: atentu ĉiujn informojn en la landa kaj federacia organo! Vi ŝparos multe da laboro al vi kaj al la respondeculoj.

Der 19. IFEF-Kongreß wird 1967 in Fulda stattfinden. Gastgeber sind wir, die deutschen Eisenbahner-Esperantisten.

Sicher sind auch Sie der Meinung, daß der Erfolg dieses Kongresses nicht nur von einigen Personen abhängen kann. Auch auf Ihre Mithilfe kommt es an. Hierzu einige Ratschläge:

Weisen Sie Ihre Umwelt auf den Kongreß hin! Hunderte von Berufskollegen aus Ost und West treffen sich. Ohne Sprachschwierigkeiten und ohne Dolmetscher.

Verbessern Sie jetzt Ihre Sprachfertigkeit! Sie wollen mit Ihren ausländischen Freunden sprechen — nicht stottern.

Werben Sie für Anfänger- und Fortgeschrittenen-Kurse! Für Kollegen mit Wechseldienst gibt es Fernlehrgänge.

Gewinnen Sie Sympathisierende! Nur wenige wollen Esperanto lernen, viele sind aber zur finanziellen und moralischen Hilfe bereit.

Melden Sie sich für die gesamte Kongreßdauer an! Nur die anwesenden Teilnehmer bestimmen den Erfolg, nicht die vorzeitig abgereisten.

Auch die Familienangehörigen sind willkommen, die Pensionäre und die jungen Eisenbahner-Esperantisten. Nutzen Sie die günstige Gelegenheit zu einem internationalen Treffen in Deutschland.

Noch etwas: Beachten Sie alle Veröffentlichungen im Landes- und Verbandsorgan. Sie ersparen sich und den Verantwortlichen viel Arbeit.

„Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten“

„Germana Esperanta Fervoĵista Asocio“

Sinonimaj piktogramoj

La intenco de la Internacia Unio de la Fervojoj (UIC) enkonduki la bildskribon en eble plej multaj terenoj de la pasaĝertrafiko, evidente renkontis malfacilaĵojn. De la t. n. piktogramoj estas akceptitaj ĝis nun nur 21, ĉar tiuj simboloj kredeble ekskluzivas erarojn. Dekomence estis diskutitaj pli multe da projektoj. Por ekzameni ilian kompreneblecon, oni aranĝis interesan teston en la stacioj Nürnberg kaj Ansbach. Sed la demanditaj vojaĝantoj reagis per neatenditaj surprizaj respondoj.

La piktogramon „sidloko por grave vunditoj“ demonstritan per la profilo de sidloko, super kiu ŝvebas trabokruĉo, taksis parto de la demanditoj kiel „bandaĝkeston“ aŭ „kupeon por malsanulo“. La silueto de kruĉsimile trastrekitata botelo, kiu prezentu la simbolon por „nenion eljeti“, estis klarigita per „trinkulo“, „malpermeso trinki alkoholon“ kaj „fenestra prenilo mankas“.

La bildsimbolo, kiu demonstru piedpedalon por manipuli la gargaron en la tualetoj kaj por depreni akvon el la lavujo, prezentas piedon, kiu tretas sur pedalon instalitan en la planko. Tiu piktogramo trovis parte jenajn klarigojn: „alarminstalaĵo“, „alarmbremsa“ kaj „ŝupurigejo“.

Glaso kun trastrekitata fluaĵo anstataŭ la surskribon „neniu trinkakvo“. Klarigita estis tiu simbolo per „sitelo“, „malpermeso lavi sin“ aŭ „neniu lavkupeo“. La piktogramon „kupeo por patri-no kaj infano“, kiu prezentas sidantan personon kun infano sur la genuoj, oni taksis kiel ordonon „prenu la infanon sur la sino!“.

Konsiderante tiujn ne kuragiĝajn rezultatojn la Internacia Unio de la Fervojoj eĉ permesis la aldonon de nacilingvaj tekstoj, se la klarigo de la bildsimbolo estas tre malfacila. Oni esperas, ke la publiko al kutimiĝos post certa tempo al la simboloj sen tekstoj.

Nia epoko preferas la simbolon. Pri tio ne estas dubo, kvankam nur limigita nombro da simboloj estas ĝenerale kaj facile kompreneblaj. Aliflanke Esperanto rajtas postuli, ke la kompetentuloj serioze esploru la valoron de la Internacia Lingvo anstataŭ partice certigi la kutimajn antaŭjuĝojn.

W.B.

Esperanto en la praktikon

La fervojaj administracioj troviĝas en la embaraso, ke la trajnpersonaro ne regas sufiĉe da fremdaj lingvoj. Tio estas rilate la pligrandigantan turismon konsiderinda malavantaĝo. Dum la veturado en la trajno la situacio ofte necesigas konversacion inter konduktoro kaj pasaĝeroj. Konkretaj demandoj postulas klarajn respondojn. La Jugoslavaj Fervojoj plenumis tiun bezonon kaj eldonis broŝuron kun preparitaj demandoj kaj respondoj en ses lingvoj. Inter tiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. Enkonduke la alparolita persono estas petata montri en la broŝuro la deziritan lingvon kaj serĉi sur tiu bazo la koncernan demandon. Numerala sistemo ebligas trovi la tradukon, tiel ke la pasaĝero fine povas legi la respondon en la dezirita lingvo.

La sistemo ne estas nova kaj ne taŭgas en ĉiuj situacioj. Sed la trajna personaro disponas almenaŭ pri lingva helpilo por sia ofte malfacila servo en internaciaj trajnoj. Gratulon al niaj jugoslavaj gekolegoj, kiuj instigis sian administracion eluzi Esperanton en tiu medio, samkiel ĝi estas praktikata jam en horaro kaj prospektoj.

„Priručik za konverzaciju“, 40 paĝoj, 125 × 200 mm, eldonita en julio 1965 de „Jugoslovenske Železnice“ sub la signo ZJZ br. 82/64-38.

Die weite Welt als Arbeitsfeld

Dies ist eine der vielen Überschriften, die dem Reisebericht in heiteren Versen vorangestellt sind. Hier stellt sich Esperanto einmal in einem anderen Gewand vor, losgelöst von der üblichen lehrhaften Strenge. Der Leser wird mit einem jungen Paar bekanntgemacht, bei dem das Mädchen ihren Freund in der Internationalen Sprache unterrichtet. Gedichtproben und Begebenheiten aus einem internationalen Kongress sind in die fortschreitende Handlung eingestreut. Man ist versucht, diese ansprechende Lektüre in einem Zuge durchzulesen, und stellt schließlich mit Freude fest, daß bald weitere Erlebnisse eines künstlerisch tätigen Esperantisten zu erwarten sind.

„Der Mensch aus jeglichem Berufe steigt einfach höher eine Stufe und ist darob fürwahr entzückt, ein Riesenschritt ist ihm geglückt.“

„Zauberwort Weltrekord“ von Lorenz Urbano, broschiert, 64 Seiten, 120 × 195 mm, Preis 4,00 DM. Bestellung über: U. Lorenz, Postfach 84, 6000 Luzern 3, Schweiz.

W.B.

Aktivaj naturamikoj

Okaze de sia 70jara ekzistado la turista asocio „La Naturamikoj“ eldonis festbroŝuron en pluraj lingvoj, i. a. ankaŭ en Esperanto. Por subteni la agadon de la esperanto-fakgrupo en la Turista Asocio, interesuloj volu mendi tiun libreton.

Festbroŝuro (titolo nekonata), 72paĝa, prezo 1,20 gm (DM). Eldoninto: Touristenverein „Die Naturfreunde“, Bundesgruppe Deutschland, 7 Stuttgart-Untertürkheim, Großlocknerstr. 28

AŬTUNO

de Theodor Storm

Nebulas, falas foliar’;
orvinon ni gustumu!
Per ĝi la grizan tagon ni
orumu, jes, orumu!

Freneze agas homoj por
diabla, krista konto.
Sed estas detruĉbla ne
la mond’, la bela mondo.

Se ĝenas kor’, la glasa tint’
ĝin hele sonorigas.
Ho sciu, vera, brava kor’
neniam disrompiĝas.

Nebulas, falas foliar’;
orvinon ni gustumu.
Per ĝi la grizan tagon ni
orumu, jes, orumu.

Traduk. de A. Giessner

El la grupoj

Duisburg. La grupo faris kun la familianoj ekskurson al la urbo Wesel la 18an de julio por viziti la tiean grupon. La komunan tablon en la gastejo ornamis Esperanto-flageto.

Parolante la Internacian Lingvon ili interesigis la ceterajn gastojn kaj kontribuis al la reputacio de Esperanto en Wesel. — Dum la aŭgusto kelkaj grupanoj feris en la jugoslava somerumejo Divljana proksima al Bela Palanka, pri kiu BULTENO jam raportis. Ili ĝuis la belegan naturon, sed ofte fuĝis el la suno, kiu kaŭzis temperaturojn ĝis 50 gradoj.

P. Hermanns

Frankfurt. La 11an de aŭgusto membroj de la „Supernumerar“-societo havis okazon vidi multajn diapozitivojn pri la IFEF-kongreso en Hamar. La intereso de la ĉestantoj estis evidenta. Fine de julio jam la frankfurta fotogrupo estis partopreninta la saman prelegon akompanitan per surbendigitaj alparoloj kaj melodioj.

Hamburg. La 11an de septembro la Fervoja Socialorganizo aranĝis grandskalan ekspozicion pri ŝatokupoj de la fervojistoj. Samtempe okazis granda ĥorfesto en la „Elbe“-bierfarejo. Ankaŭ la ticia Esper-

Nia ŝerco Aventuro en tunelo

Malhumila juna viro veturis en la fervojo, sola en kupeo kun eleganta, bela sinjorino.

Venis tunelo

Kvin minutojn, post kiam denove heliĝis, li komencis denove konversacion: „Bonvolu pardoni al mi, estimata sinjorino, ke mi provis kisi vin. Estas kutimo, kaj mi timis ofendi vin, se mi ne estus provinta tion . . .“

„Tion mi ankaŭ pensis“, diris la bela sinjorino. „Pro tio vi ankaŭ havas komprenon, se pro la sama kaŭzo mi donis al vi la kutiman vangofrapon.

Traduk. de E.K.

19a IFEF-kongreso

La preparoj por la 19a IFEF-kongreso 1967 en Fulda jam komenciĝis. Formiĝis la Loka Kongresa Komitato, kiu kunvenis unuafoje la 17an de septembro. La antaŭvideblaj taskoj estis distribuataj. Intertempe la urbestro de Fulda deklaris san simpatian al la IFEF-kongreso kaj certigis, ke la barokstila „orangĉerio“ estos je la dispono kiel kongresejo. Tiu konstruaĵo aperos sur la glumarko kaj la kongresinsigno. Ankaŭ la lokaj gazetoj jam anoncis la projektitan IFEF-kongreson.

anto-grupo estis reprezentita per multnombraj eksponitaj objektoj pri la Internacia Lingvo. La intereso de la vizitantoj estis vigla, la raportoj en la gazetoj favoraj.

Lepke

BULTENO

BULTENO, la informilo de nia asocio, eniras per tiu eldono la 14an jaron de sia ekzisto. Ni dankas sincere al la ĉefestraro de la „Bundesbahn-Sozialwerk“ pro ĝia konstanta subteno kaj same al niaj fidelaj legantoj en- kaj eksterlandaj.

La redakcio

Ni legis en...

Anoncoj

Pri la pasinta IFEF-kongreso raportis pli malpli detale kaj sprite jenaj gazetoj: **FERVOJISTO**, organo de niaj nederlandaj kolegoj, **GERMANA ESPERANTO-REVUO**, **ITALA FERVOJISTO**, **JEN**, organo de niaj britaj kolegoj, **La Fervojo**, organo de niaj francaj kolegoj, **Svisa Fervojo** kaj **THE WORKER ESPERANTIST**, organo de la brita laboristaro.

ARGENTINA ESPERANTISTO priskribas (en n-ro 356) la 13an argentinan kongreson en Rio Cuarto.

Der Schulspeigel, die in Duisburg erscheinende Schülerzeitung eines Mäd-

chengymnasiums, befaßt sich (in Nr. 1/65) in einer ungewöhnlich frischen Form mit Esperanto. Das Interview kam durch die dortigen Eisenbahner-Esperantisten zustande.

LANTERNO nomiĝas gazeto novaperinta en Germanio kun skurilaj titolliteroj, kies, neneŭtrala enhavo evidente celas kontraŭdiktatorajn tendencojn. La atentinda unua eldono ĉefe okupiĝas pri la titoista reĝimo en Jugoslavio.


ZPRAVY, informoj de la ĉeĥoslovaka Esperanto-komitato informas (en n-ro 1(17)) grandskale pri la aktiva agado de la lokaj grupoj.

W.B.

17jara studento deziras korespondon kun germanaj fervojistoj. Adreso: s-ro William Overington, 15 Grove Avenue, Honeybourne, Evesham/Wocs, Anglio.

Frydek Mistek, urbo idilie situanta en Ĉeĥoslovakio, festis tiujare sian 700jaran jubileon kiel urbo. Pro tiu evento la urbestraro eldonis faldprospekton. Adreso: Me NV, Frydek Mistek, Ĉeĥoslovakio.

Okaze de la venonta 51a UE-kongreso 1966 en Budapeŝt aperis plaĉa dukolora prospekto pri Hungarlando kun aldonita prezlito. Eldoninto: Loka Kongresa Komitato de 51a Universala Kongreso de Esperanto, Pf. 193, Budapeŝt 3, Hungario



*Tiu trajno
tirata de elektra lokomotivo
veturas
tra la romantika
"Rejn"-valo.
Kun siaj vitejoj kaj kasteloj
ĝi estas
unu el la plej belaj
kaj plej multe vizitataj
regionoj en Germanio.*

*Eble
vi prenos tiun vojon
vojaĝante meze de oktobro
al la 9a jarkunveno
de nia asocio
en Stuttgart
aŭ venontjare, en majo,
al la 18a IFEF-kongreso
en Utreĥt (Nederlando).*

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck / presio: Limburger Vereinsdruckeri, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.